

## & Infanoj de zorgo:

< Rekante 27 el 49 batoj por strofo, entute 588 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Gerder?. El ? tradukis? Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<1,7:49> (

/do SoSo do re Tido rere; mi dodore fa redo TiSo; do SoSo do re Tido rere; mi dodore fa laso fami;

(#Rekantaĵe: re Tido reTi mi do; re Tido reTi mi do LaLa So; : re Tido reTi mi do; re Tido reTi mi do LaLa So Ti do o)

)×12 )+

### (&Strofoj:

< El Gerder.>

'1 /Finiĝis varmega jam tago, ; Kaj nokto agrabla fariĝis, ; Sub ombra cipreso, ĉe lago ; Diino de Zorgo sidiĝis.

(×: **Dancu ni vigle sur la ; Dancu ni vigle sur la firma ter' ; Dancu ni vigle sur la ; Dancu ni vigle sur la firma tera grund'.**)

'2 El ruĝa argilo Diino ; Malgaje figuron skulptadis, - ; Kaj luno, de nokto reĝino, ; De blua ĉiel' rigardadis. ....

'3 Jen Zeŭso al bela Diino ; Parolis kun dia favoro: ; "Rakontu, malgaja knabino, ; Pri via doloro en koro? .....

'4 "Ho, Zeŭso, Diino rediras: ; Alportu al mi vi plezuron! ; De vi mi nur solan deziras: ; Vivigu vi mian figuron!" .....

'5 - Volonte! Mi vin kontentigos: ; Viviĝas figuro jam via! ; Sed tamen de nun mi devigos, ; Ke estu eterne ĝi mia! - .....

'6 "Ho, ne! Al li Zorgo parolas: ; Figuron mi longe skulptadis, ; Al vi mi ĝin cedi ne volas, ; Ĉar ĝin mi por mi preparadis! .....

'7 Por mi ĝin restigu!" korege ; Ŝi Zeŭson potencan admonis. ; - Ho, ne! mi ĝin amas varmege, ; Al ĝi ĉar animon mi donis! - .....

'8 "Pro kio disputon vi tenas?" ; Subite la Ter' al li diras: ; Al mi ĝi sen dub' apartenas, ; Ĉar tera en teron foriras!" .....

'9 Kaj dioj disputis senfine, ; Ĉar cedi neniu deziris ; Figuron argilan, - sed fine ; Al Kron' ili ĉiuj ekiris. ....

'10 "Ĉar unu al dua ne volis ; Figuron vi tiun-ĉi cedi, -" ; Grishara Saturn' ekparolis: ; "Vi kune ĝin povas posedi." .....

'11 "Aŭskultu-do, dioj: nur kiam ; Ĝi moertos, anim' apartenos ; Al Zeŭso potenco, - kaj tiam ; Jam Ter' ĝian korpon alprenos. ....

'12 Kaj vi, ho, de Zorgo Diino, ; Ĝin povas posedi ĝis morto!" ; Mi pensas, ke tia difino ; Similas al homa la sorto? .....